

## ADORU 424

1. Be - le - ga ste - lo de l' ma - ten',  
Ji - ŝa - ja flor', Da - vi - da fil',  
en gra - ca kaj ve - re - ca plen',  
fi - an - ĉo el ĉi - e - la bril',  
lu - man - ta su - pren - i - ris.  
Vi ko - ron mi - an ti - ris.  
Ra - va, sa - va, kaj a - mi - ka,  
mult - e - fi - ka, don - ri - ĉe - ga,  
al - ta, mi - re ma - jes - te - ga!

2. Valora kron' en perla bril',  
de Dio kaj Maria fil',  
nobela reĝo mia,  
miel-odora rozo-flor',  
lilio, blanka je kolor',  
min kaptis amo Via.

Jen mi  
sen Vi  
nur sopiras.  
Vin deziras  
mia koro,  
vokas larme kun fervoro.

3. De Dio venas ĝojo-hel'  
al mi, se Vi el la ĉiel'  
amike min rigardas.  
Jesu', spirit', riĉaĵo, fort',  
per Via karno, sango, vort'  
mistere Vi min vartas.  
Venu,  
prenu  
en la manojn  
la infanojn  
pro kompatato.  
Mi aliras invitato.
4. Eksonu kordoj kaj orgen'.  
Ekkantu kor' en ĝojo-plen'  
kun dolĉa melodio,  
ke Kristo estas la Sinjor'  
por mi, juvelo kaj trezor',  
anima vivo, ĉio.  
Sonoj,  
tonoj  
jubiladu,  
triumfadu  
en ĉi ĥoro:  
Dankon, reĝo de l' honoro!
5. Gajege kantas mia kor':  
Komenco, fino la Sinjor',  
la alfa kaj omega.  
Post mia vivo je la glor'  
de Lia nomo migros for  
ĉielen mi ĝojega.  
Amen,  
amen,  
nin vizitu,  
ne hezitu,  
kron' de l' ĝojo.  
Al Vi celas mia vojo.

WIE SCHÖN LEUCHTET DER MORGENSTERN • GL 554 • EG 70 • KG  
194 • RG 653 • EM 196 • M (Wie schön leuchtet) kaj germana T: Philipp  
Nicolai 1599 • E: ĉe Kindler n. 28, prilaborita de Albrecht Kronenberger 1994  
kaj Kloster Kirchberg 1998 • † 2 Pet 1,19

Post 2001 Adolf Burkhardt malkovris ĝis tiam de ĉiuj preterviditan miskom-  
prenon en la 5a strofo kaj, samtempe forigante la adasismon, ŝanĝis  
«alvenadu, ne restadu» al: «nin vizitu, ne hezitu». (La germana «bleib nicht  
lange» tie ĉi havas la sencon de «bleib nicht lange aus», tio signifas: «ne  
prokrastu vian venon».)